



Cathy Freeman



Susie O'Neill



Aŭstralia Hoketeamo



Simon Fairweather



Ian Thorpe

OLIMPIKAJ ORULOJ DE AŬSTRALAZIO 2000

Esperanto sub la Suda Kruco

Novembro-Decembro 2000
Numero 48 (vol. 8, no. 6)



Grant Hackett

ISSN 1039-9380



Rob Waddell

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 48 (volumo 8, numero 6), Novembro-December 2000

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio
☎: (08) 9641 1937
Faksoj: (08) 9641 1134
E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

“Kulturo” kaj lingvinstruado (Bill Maxey)	3
Pri la Esperanta gramatiko (1) (Donald Broadribb)	5
Afero de trafiko (Franciska Toubale)	9
Nia konkurso: rezultoj	10
La deveno de “krokodili” (André Cherpillod)	11
What is a participle (Marcel Leere- veld)	12
Laŭ la Interreto	18
Deziras korespondi	20
Diversaĵoj	21
Nekrologo: Jackie Turvey	24
Odlo Bokserp	25
Nekrologo: Ellen Ryde Lymburn	26

Recenzoj:

<i>Aŭstralasian-Esperanto Dictionary</i> parto 2 (Marcel Leereveld)	14
--	----

Indekso/Index

ESK estas legebla per la Interreto:
<http://www.poboxes.com/esk>

Limdato por artikoloj por la januara numero: 8 decembro.

La kovrilbildo: Fotoj de la Aŭstralaziaj gajnintoj en la Olimpikaj Ludoj 2000: Cathy Freeman, Susie O'Neill, Simon Fairweather, Ian Thorpe, Grant Hackett — ĉiuj el Aŭstralio; Rob Waddell el Nov-Zelando.

“KULTURO” KAJ LINGVINSTRUADO

de Bill Maxey

Mi hodiaŭ prezentos al vi kelkajn pensojn pri kulturo kaj la instruado de Esperanto. Malgraŭ ilia longeco, pri kio mi ja konscias, mi aŭdacas peti viajn atenton kaj reagojn, kiuj certe multe kontribuos al la evoluigo de la temo.

En Usono la “American Council on the Teaching of Foreign Languages” (Usona Konsilio pri la Instruado de Fremdaj Lingvoj) publikigis en 1996 siajn “National Standards for Foreign Language Learning” (Naciaj Normoj por Fremdlingva Lernado), kiuj estas gvidlinioj por edukaj instancoj kiuj ellaboras studplanojn kaj instruistoj kiuj planas kursojn.

Kulturo estas enplektita kun aliaj celobjektoj kiel nemalhavebla elemento en la instruado de fremdaj lingvoj. “Efektive,” oni (aliloke) diras, “lernantoj ne povas vere regi lingvon ĝis ili regas ankaŭ la kulturajn kuntekstojn en kiuj la lingvo okazas.” Plue: “Kune, tiuj ĉi elementoj ebligas ke la lingvolernanto partoprenu en multlingvaj komunumoj hejme kaj ĉirkaŭ la mondo en diversaj kunteksto kaj en manieroj kulture konvenaj,” t.e., la lernantoj ne nur regu la lingvon, sed efektive sciu “kiel kaj kiam diri kion al kiu.”

La normoj rilate kulturon rigardas ĝin kiel karakterizan interrilaton inter ĉiuj pli-malpli kundividitaj perspektivoj en iu socio kiuj kondukas al tipaj agmanieroj (gestoj, salutoj, kutimoj, moroj, festoj, k.s.) kaj produktoj (literaturo, politikaj sistemoj, legendoj, artaĵoj, vestoj, manĝaĵoj, gazetoj, ludoj, k.s.). Por atingi la normojn la lingvaj lernantoj devas montri komprenon pri la perspektivoj, agmani-

eroj, kaj produktoj kaj pri kiel tiuj ĉi interrilatas inter si.

Mi nuntempe klopodas alrigardi Esperanton kadre de tiu konceptaro. Ni membroj de la tutmonda Esperantokomunumo emas rapide kaj eĉ fanfarone (ofte eĉ iom indigne) respondi al demanditoj kaj kritikuloj ke ja certe ekzistas Esperantokulturo. Tamen al kiu grado tiu respondo spegulas nur la nedisputeblan ekziston de nia literaturo? Ĉu ni vere havas kulturan heredaĵon, iel similan al naciaj kulturoj? Kelkaj provizoraj konkludoj:

1. Verŝajne eventuala Esperantokulturo ja havas kelkajn identigeblajn “perspektivojn,” kiuj iugrade karakterizas la plimulton de la aktivaj komunumanoj. Inter tiuj estus toleremo, emo al paco, interesiĝo pri la mondo kaj aliaj homoj kaj popoloj, zorgemo pri la monda problemaro, progresemo, kaj antaŭenrigardemo. Kompreneble, same kiel en aliaj kulturoj, la tipaj trajtoj ne karakterizas ĉiun.

2. Memevidente la Esperantokulturo havas sian propran literaturon, en kies produktoj eĉ konstateble ripetiĝas certaj oftaj temfadenoj. Tamen krom la literaturo, ŝajne ne ekzistas aliaj produktoj kiuj estas rekoneble “Esperantaj.” Ekz. ne estas muziko, dancoj, pentrado, arkitekturo, artaĵoj, manĝaĵoj, ktp, kies stiloj estas identigeble Esperantaj. Certe ekzistas muziko kun Esperantolingvaj vortoj, kaj kelkkaze ludata de konataj “Esperantaj” muzikistoj (ekz. Kajto—kiu fakte ludas sub alia nomo ekster Esperantio), tamen la *stilo* de la muziko ne estas karakterize “Esperan-

ta.” Verŝajne ne eblas ke Esperanta muziko, danco, pentrado, k.s. povus ekzisti same kiel ekz. sufiĉe facile identigebla Hispana, Franca, Brazila, kaj Ĉina arto.

3. Esperanto kaj ties lingva komunumo havas propran historion, tamen mi ne certas ĉu tiu estas parto de la perspektivo aŭ parto de la produktaro. Efektive ĝi ŝajne estas produkto kiu forte influas la perspektivojn. Ankaŭ la Esperantoflago rilatas al la historio, ĉu ne, tamen ĝi ne estas vera produkto de la kulturo sed “nur” simbolo. Simile rolas poŝtmarkoj, moneroj, k.s.

4. Sentemaj Esperantistoj certe ĵurus ke ekzistas aro da kutimoj, moroj, ktp, ene de Esperantio. Tamen imageble temas precipe pri toleremo kaj emo “malfunkciigi” la naciajn kutimojn dum ĉeesto en Esperantoio kaj ne juĝi aliajn per ili. Se Esperantisto do farus ion kio laŭ alies naciaj moroj estus ofenda, oni preteratentus tion, supozante ke li/ŝi ne intencis ofendi, pro tio ke la ago ne estas tia en la nacia kulturo de la aginto.

5. Dum Esperantistaj plenkreskuloj (aparte tiuj kiuj longe aktivis en la kultura vivo) forte sentas Esperantan kulturon pro la aferoj supre menciitaj, verŝajne infanoj (krom eventuale denaskuloj) ne povas senti tiun kulturon, pro la forta ĉieo de la nacia kulturo kaj manko de kapablo apartigi la diversajn trajtojn.

Nu, mia kuranta demando do estas (1) ĉu instrui pri Esperantokulturo en Esperantolingvaj kursoj, kaj, (2) se jes, kion kaj kiel. En kursoj por adoleskuloj kaj plenkreskuloj oni ja kutime instruas almenaŭ iom pri la Esperantohistorio kaj literaturo kaj la bazaj “faktoj” pri la “reala” Esperantomondo: kongresoj, Pasporta Servo,

delegita reto, TTT-ejoj, ktp. Tamen kion oni instruu al bazlernejanaj? Mi ĉiam prezentas la historion pri d-ro Zamenhof, kies naskiĝtagon ni ĉiam festas; ni priparolas la flagon; ni iel aktive festas la Semajnon de Internacia Amikeco. Krome mi raportas al la lernantoj pri miaj propraj “vizitoj al Esperantio” dum la jaro (ekz. por partopreni iun renkontiĝon). Iomete malpli “Esperanta” estas festo de la Tago de UN, la 24a de oktobro, kiam ni i.a. diskutas la neceson por kunlaborado inter la nacioj de la mondo. Mi emas aldoni al tiuj apartan atenton al la naskiĝtago de Gandhi kaj eble aliaj tiaj tutmonde admirendaj homoj.

Tamen, mi konvinkiĝas ke estas tute konvene kadre de Esperantoinstruado studi ĉefe ne ian nebulan supernacian Esperantokulturon sed anstataŭe kelkajn diversajn naciajn kulturojn.

Kiel opinias vi en tre multaj landoj ekster Norda Ameriko? Kiel vi konceptas la problemon kaj kiel vi pri-traktas kulturon en viaj propraj kursoj? Ĉu Esperanto vere havas kulturon kun perspektivoj, kutimoj, kaj produktoj kun konstateblaj kaj instrueblaj rilatoj inter si? Ĉu entute necesas instrui kulturon kiel integran parton de lingva instruado? Ĉu la ideo pri la inkluzivo de kulturo estas kutima parto de profesia lingvoinstruado en aliaj landoj?

Kiam ni instruas pri diversaj kulturoj (kiel faras ekz. la partoprenantoj en la ILEI-projekto Interkulturo), ĉu tion ni faras ĉar Esperanto verdire ne havas propran kulturon? Aŭ ĉu tiuj aliaj kulturoj estas kvazaŭ nia natura propraĵo kaj la plej indaj reprezentantoj de niaj perspektivoj? Aŭ ĉu nur flanka afero, interesa kaj

utilaa, periferie rilate al Esperanto, sed tute ne necesa, kaj vere ne parto de lingvoinstruado?

Kion ni instru tiurilate?

Mi tre multe dankus vian atenton al tiu ĉi temo kaj avide atendas viajn pensojn tiurilate.

Bill Maxey
(<bmaxey@visi.net>)

(Parenteze, mi diras ke mi ne emas konsenti kun tiuj kiuj diras ke necesas instrui pri la Esperantokulturo “por certigi ke la gelernantoj restu en la Esperantomovado.” Laŭ mi, varbado estas truda afero en lingva kurso.

Oni prezentu kiel eble plej altkvalitan lingvan kurson, interesan kaj taŭgan por la kontentiga progreso de la lernantoj. Kiam la instruisto povas certigi ke ili regas la lingvon mem, tiu estas la plej bona situacio por plua aktiveco en la Esperantokomunumo. La instruistoj pri aliaj fremdaj lingvoj ne kutimas varbi lernantojn al aktiveco en sia lingva komunumo; ili kondukas la lernantojn laŭ vojo kiu kiel eble plej multe faciligas tiun partoprenadon se la lernanto mem elektos tion. Miaopinie, Esperanto-instruistoj faru same. Tamen, la ŝlosila afero estas *bonega* kurso.)

[-- fonto: ret-info]

PRI LA ESPERANTA GRAMATIKO

de Donald Broadribb

(Parto 1: Morfologio)

En nia septembro-oktobra numero, Marcel Leereveld esprimis sian miron pri opinio esprimita de mi. Specife, mi kritikis la tradiciajn “grek-latinajn” kategoriojn uzatajn en diversaj gramatiklibroj de Esperanto. Li petis ke mi klarigu mian vidpunkton.

Ludwik Lejzer Zamenhof eldonis sian “Unuan Libron” pri Esperanto en la jaro 1887. Lia patro estis plurlingvulo kiu profesiis pri lingvoj, kvankam ni ne scias ĝuste kian edukon pri lingvistiko li ricevis. Ni ankaŭ nenion scias pri la lingva edukiĝo de Ludwik, kvankam diversaj biografoj klopodis diveni tion el liaj diversaj diraĵoj kaj verkoj. Ni ja scias ke li bone konis la Polan, la Hebrean, kaj la Jidan lingvojn, verŝajne ankaŭ la Rusan. Ni ankaŭ scias ke li, malpli

bone, konis la Anglan, Francan, Germanan, kaj eble la Latinan lingvojn, kaj verŝajne nur supraĵe la Grekan.

Estas rimarkinde ke en tiu sama epoko instruadis grava lingvisto Ferdinand de Saussure, en Ĝenevo. Lia verko *Cours de linguistique générale* estis publikigita nur en 1916, kaj eĉ tiam nur laŭ lekcinotoj faritaj de liaj studentoj. El tiu verko kreskis la STRUKTURISMA SKOLO de lingvistiko, kiu regis grandan parton de la 20a jarcento kaj ankoraŭ estas gravega ilo en la manoj de lingvistoj.

Ja povas esti ke la teoriojn de Ferdinand de Saussure jam konis Zamenhof-patro kaj/aŭ Zamenhof-filo, sed pri tio ni ne scias. Ni ja scias ke frato de Ferdinand de Saussure, René de Saussure, estis tre eminenta

Esperantisto kaj multe influis la oficialajn decidojn pri la gramatiko de Esperanto en la fruaj 1900'oj — al li ni ŝuldas la tre gravan “Principo de Necesoj kaj Sufiĉo” kiu estas unu el la ĉefbazoj de la vortformado en Esperanto.

Nepre tre interese estas ke la metodo laŭ kiu L.L. Zamenhof konstruis Esperanton, laŭ liaj fruaj diskutoj pri tio, forte kongruis kun la principoj de la estonta STRUKTURISMA SKOLO. Zamenhof deklaris ke li konstruis Esperanton el la aro da sendependaj partoj, kiujn li nomis “vortoj”. Ekzemple, li diris, *libro* konsistas el du “vortoj”: *libr* kaj *o*. *Skribaĵo* konsistas el tri “vortoj”, *skrib* kaj *aĵ* kaj *o*. *Malsanulejo* konsistas el kvin “vortoj”: *mal*, *san*, *ul*, *ej* kaj *o*.

Zamenhof en tiaj diskutoj uzis la terminon “vorto” por la signifo kiun la strukturistoj poste nomis “morfemo”. Por eviti miskomprenon, mi preferas en ĉi tiu artikolo uzi la terminon “ero” anstataŭ “vorto”¹ laŭ la senco donita de Zamenhof.

La lingvo Esperanto konsistas el plurmil tiaj sendependaj morfemoj/eroj, libere kunglueblaj — la kungluadon limigas nur la senco de la eroj kaj de la tuto, kaj la praktika manipulebleco de la rezulto. Ekzemple, *malsanulejo* estas relative facile uzbla termino, sed *malsanulejistedzinrobrando* estas tre malfacile komprenata tutaĵo.

Zamenhof ankaŭ komentis ke li uzis la tradician gramatikan terminaron nur por plifamiliarigi al tradiciuloj la aspekton de la Esperanta gramatiko, sed ke tio estas nur vesto, ia masko, por la subkuŝanta strukturo de la lingvo.

En la frua epoko de Esperanto la ordo de eroj estis multe pli libera ol

en la Esperantuzo kiun ni nuntempe konas. Ekzemple, Zamenhof senĝene parolis pri *bovoviro* kvankam ni nuntempe parolas pri *virbovo*. *Bovoviro* paralelis la terminon *bovino*, kaj ambaŭ estis similmaniere klarigitaj:

bov-[o]-vir-o

bov-in-o

la [o] estis nur por faciligi prononcon.

Buĉistedzino analizigis tiel:

buĉ-ist-edz-in-o

= “*ina edzo*” de *profesia buĉ-persono*.

Tia analizo estas iom nekutima, kaj tial ne tre facila, por nuntempaj Esperantistoj, ĉar ni emas pensi laŭ alia sistemo de vortanalizado, sed ĝi estis ŝajne tute natura por Zamenhof. Parte tio estas ĉar plejparte ni mem konas nur la hindeŭropajn lingvojn, dum Zamenhof tre familiaris ankaŭ kun la Hebrea lingvo, kiu estas el tute alia lingvofamilio kaj havas tute alian gramatikanalیزan sistemon¹.

Kiom la Hebrea gramatika skemo influis la Esperantan gramatikon estas interesa kaj plurfoje diskutita temo, grava por ni ĉimomente nur per la konstato de la Hebrea sistemo estis la bazo de multaj detaloj de la verbosistemo en Esperanto.

Kvankam tradicie ni kutimas al la terminoj *substantivo*, *adjektivo*, *adverbo*, *prepozico*, *singularo*, *pluralo*, kc. kc., estas argumenteble ke multe pli fidela al la originala strukturo de Esperanto estas la terminaro uzata de Wennergren en sia *Plena Manlibro de la Esperanta Gramatiko* [PMEG]:

O-vortoj, A-vortoj, E-vortoj, Rol-

¹Mi parolas pri la klasika Hebrea lingvo, ekz. en la Biblio. La moderna Hebrea lingvo nuntempe parolata en Israelo havas gramatikan sistemon reformulitan laŭ Hindeŭropa skemo.

montriloj, Unu-nombro kaj Multe-nombro, Difiniloj, E-vortecaj vortetoj, O-vortecaj kaj A-vortecaj vortetoj, kc. Povas esti ke la tradiciaj grek-latinaj terminoj estas pli “facilaj” por adapti la studon de la Esperanta gramatiko al la tradicia 19-jarcenta sistemo, sed la terminaro uzata de Wennergren estas multe pli fidela al la origina spirito de Esperanto. Kelkrilate, ja temas nur pri nomoj, kaj pri ili mi ne volas insisti. Sed notindas ke kuŝas sub tiu alia terminaro rekono ke la gramatiko de Esperanto estis esence formulita laŭ aliaj principoj ol la Hindeŭropa sistemo.

Kiam temas pri tio, kion ni plej ofte konceptas per la termino “gramatiko” la nomoj povas esti tre gravaj. Ekzemple, “La rolfinajo N” (Wennergren) estas laŭ mia opinio multe pli uzinda termino ol “akuzativo”, ĉar “akuzativo” pensigas pri gramatikaj kategorioj en la Eŭropaj lingvoj, kaj precipe en la Latina kaj Greka lingvoj, sed la *rol-finajo N* Esperanta vere estas nur “trudŝovebla” en tiajn kategoriojn. Ĝi vere estas puresperantaĵo, en la rolaro donita al ĝi de Zamenhof. Precize tiun rolaron havas la akuzativo en neniu alia lingvo.

Mi tamen ne apologias por Wennergren. Marcel parte pravas, kvankam nur parte, kiam li diras ke Wennergren nur kosmetike renommas tradiciajn analizkategoriojn.

Mi reiru al la strukturismo:

Ni pensu pri nelonga esprimo: *tre granda kato*. Tiu esprimo konsistas el la sekvantaj kvin eroj: *tre, grand, a, kat, o*.

La eroj *o* kaj *a* estas neliberaj, t.e. ili ne povas ekzisti neakompanate. Kontraste, *kat, grand*, kaj *tre* estas liberaj, t.e. ĉiu el ili estas en si mem kompleta. (Tradicie, kiam tio okazas,

ni skribas ankaŭ apostrofon por la unuaj du: *kat’, grand’*. Temas, tamen, nur pri ortografia konvencio, kaj *ne* pri gramatiko). Atentu ke ĝuste nun ni ne parolas pri la signifo de la eroj, nur pri ilia libereco/nelibereco.

Esperanto estas preskaŭ, sed ne tute, unika pro la senvarieco de ĉiu ero en la lingvo².

Esperanto estas ankaŭ plene unika pro la ebleco kunligi kiujn ajn erojn (“morfemojn”). Laŭteorie ĉia kungrupigo estas ebla. Praktike, limigas la kungrupigadon la bezono ke la rezulto havu facile kompreneblan senco por la aŭskultanto(j)³.

Laŭ ĉi tiu vidpunkto, do, kaj kontraste al la tradicia latin-grek-kategoria analizado favorata de Marcel, principe *neniu* kungrupigo estas malpermesata. Nek “bonvolu”, nek “bluokulo” nek “fare de”, nek multaj aliaj er-grupoj estas eraraj, malgraŭ la protestoj de personoj kiuj volas ŝovi Esperanton en la grek-latin-kategoriajn “vitrajn ŝuojn”. La sola principo por decidi pri “ĝusteco” estas ĉu la grupigo havas kompreneblan signifon por la aŭskultanto, en la kunteksto kie ĝi troviĝas.

Ke ĉi tiu estis la origina vidpunkto de Zamenhof kiam li publikigis Esperanton, atestas la fakto ke pluraj el la “malpermesataj” formoj estis libere uzataj de li en lia verkado. Li verkadis ne laŭ gramatikaj teorioj, sed laŭ la libera principo de vortsignifo.

Pli pri terminologio: por sekvi la terminologiajn kutimojn de la legantoj de *ESK*, mi uzos la konvenciojn nomi “ligitan” kungrupigon de eroj

² Strukturlingvistike: En Esperanto estas nur morfemoj, sen alomorfoj.

³ Laŭ la Strukturisma skolo, parolateco estas ĉiam la ĉefbazo.

“vorto”: do *kat+o* = du eroj = unu “vorto”, *kato*⁴.

Laŭ la Esperanta skribtradicio, *granda* konsideriĝas unu “vorto”, kvankam kaj ĝi kaj *kato* konsistas el du eroj. *Tre* konsideriĝas nur unu vorto, pro la konstato ke la *e* de *tre* ne identas kun la ero *e* ĉe la preskaŭsinonima “vorto” *multe*. La kaŭzo estas ke *tr* ne ekzistas en Esperanto kiel sendependa ero (“morfemo”).

Denove mi atentigas: temas ne pri gramatika afero sed pri ortografia tradicio.

Utilas analizi ke la *a*, *e*, *i*, *o*, *n*, kaj kelkaj aliaj eroj konsistigas grupon de *rolmontriloj*, dum la aliaj eroj kiaj *granda*, *kat*, kaj miloj da aliaj, konsistigas ĉefe semantikan grupon. Sed tiaj distingoj apartenas al “semologio” (la signif-aspekto de la eroj) multe pli ol al la “morfologio” (la formo de la eroj).

Laŭ la origina karaktero de Esperanto, ŝajnas ke nur tiuj du grupoj ekzistas. Distingoj kiaj “prefikso/su-

fikso”, kaj aliaj “-fiksoj” ne havas lokon en ĉi tiu analizo⁶. Tiaj distingoj, pri kiuj neniam povas plene interakordi la Esperantologoj, ĉefe problemas por gramatikstudantoj simple ĉar ili ne havas veran rolon en Esperanto. Pro ilia familiareco en la etnaj lingvoj, oni strebas transŝovi ilin vitraŝue en Esperanton kie ili efektive ne ekzistas.

Gravas ne konfuzi semantikan signifon kaj gramatikon. Multaj disputoj pri ĉu *ankaŭ*, *ankoraŭ*, *morgaŭ*, kaj aliaj “aŭ-vortoj” estas samklasaj perdas sian sencon; ankaŭ kvereloj pri la “gramatika kategorienco” de multaj sendependaj eroj estas sensecaj.

En parto 2 de ĉi tiu artikolo mi diskutos la verbformojn Esperantajn, kiuj ankaŭ prezentas interesan specife Esperantan karakteron. □

⁴Kio konsistigas “vorton” varias tre multe inter diversaj lingvoj. Ekz., en la Angla lingvo *I will write* konsideriĝas tri “vortoj”, sed *I'll write* nur du; en Esperanto *mi skribos* konsideriĝas du “vortoj”; en la Hebrew, *ektob* konsideriĝas nur unu “vorto”. Tamen, ĉiufoje temas pri precize tri morfemoj. Temas nur pri ortografia tradicio ĉu ni nomas la parolaĵon unu, du, aŭ tri “vortoj”.

⁵Notu iujn kuriozajn vortkonstruojn kiujn Zamenhof proponis al Esperanto. *Princedzino*, laŭ Zamenhof, signifas “edzino de princo”. Laŭ tiu principo, en la Brita reĝa familio, Princo Phillip estas la *Reĝinedzo*, la edzo de Reĝino Elizabeth II; ŝia patrino estas Elizabeth la vidvina *Reĝedzino*, la edzino de Reĝo George VI kiu mortis en 1952. Nuntempe, escepte en kelkaj tiaj specialaj kazoj, ni ne kutimas titoli personon laŭ la profesio aŭ socia stato de ties edz(in)o, en la Angla lingvo, tiel ke sonas strange al ni nomi iun Doktoredzino aŭ Profesorinedzo, ks.

“Cu vi rimarkis kiel bele pentras tiu knabineto?”

“Jes.”

“Bone! Knabineto, mi petas, pentru al tiu sinjoro tason da teo!”

“Ĉu sen aŭ kun sukero?”



AFERO DE TRAFIKO de Franciska Toubale

Antaŭ kelkaj monatoj Marcel atentigis la legantojn de *ESK* pri la kondiĉoj por atingi sekuran veturadon por si mem kaj por la aliaj vojudantoj. Ŝajnas ke tiuj konsiloj ne validas en ĉiuj landoj, kaj precipe ne en Vietnamo.

Unue, vi devas scii ke la trotuaro ne estas irejo por piedirantoj, sed loko por stapli varojn, aŭ sidi kaj ripozi, aŭ eĉ por manĝi.

La blanka linio en la mezo de la strato ne dividas ĝin en du partojn por ke la inversdirektaj trafikoj ne intermiksiĝu, sed montras la vojon al la nenombreblaj aŭtomobiloj, dum la bicikloj, motorcikloj kaj ĵinrikŝoj en densaj vicoj okupas la ceteron.

La ruĝa lumo ne ĉiam signifas "Haltu!"

Tamen, mirakle antaŭeniras la trafiko kun konstanta zumado de motor-

oj kaj hupoj de la aŭtomobiloj — relative malrapide, sed rekte al la celata loko.

Je ĉiu krucvojo okazas kvazaŭ baleto. La veturiloj renkontpasas unu la alian same kiel piedirantoj en granda amaso. Imagu pli kompleksan version de la fama Skota danco "La Granda Marŝo". La oraj reguloj estas:

- Akrigu vian juĝkapablon
- neniam hezitu
- klare indiku per viaj korpmovoj kien vi intencas iri
- estu preta ŝanĝi vian trajektorion rapidege

Tiuj reguloj ankoraŭ pli validas por la piediranto kiu deziras trairi vojon. □

"Ĝis via kvindekjariĝo vi suferos pro manko de mono."

"Kaj poste?"

"Poste vi alkutimiĝos". diras la aŭguristino.

NIA KONKURSO (ESK 47)

RESPONDOJ

Atingis nin kvin respondoj — unu de Odlo Bokserp (legebla sur p.26 de ĉi tiu numero). El ili, nur unu estis tute ĝusta gramatike. Ĝin sendis Franciska Toubale, kiu ricevos la promesitan libropremion. Odlo ricevos malpremion.

Ĉisube estas respondoj kiuj, laŭ la vidpunkto de la redaktoro, estas ĝustaj kaj gramatike, kaj stile:

- | | |
|---|--|
| <p>1. <i>I shall go tomorrow, if I feel well.</i>
Mi iros morgaŭ, se mi fartos bone.</p> | <p>Mi konsilas foriri nun kaj pardonpeti/por pardonpeti.</p> |
| <p>2. <i>He has surely arrived in time, if the plane has had no delay.</i>
Li nepre alvenis akurate, se la aviadilo ne malfruis.</p> | <p>10. <i>You should have come, if you were not ill.</i>
Vi nepre devus veni [esti veninta¹], se vi ne estus malsana.</p> |
| <p>3. <i>If they can make up their minds, we know what to expect.</i>
Se ili povos decidi, ni scias kion antaŭvidi.</p> | <p>11. <i>You should come to the party, it will be terrific.</i>
Nepre venu al la festo, ĝi estos bonega.</p> |
| <p>4. <i>I would go tomorrow, if I had the money.</i>
Mi irus morgaŭ, se mi havus sufiĉan monon.</p> | <p>12. <i>You would not do that to me, would you?</i>
Vi ja ne farus tion al mi, ĉu?</p> |
| <p>5. <i>I would have left earlier, if I had known the time.</i>
Mi forirus [estus foririnta¹] pli frue, se mi scius kioma horo estas.</p> | <p>13. <i>Had he come, I would have left.</i>
Se li venus, mi ja forirus [estus foririnta¹].</p> |
| <p>6. <i>If I had known that, I could have helped her.</i>
Se mi scius tion, mi povus [estus povinta¹] helpi ŝin.</p> | <p>14. <i>If I were you, you'd better accept it.</i>
Nepre akceptu, mi farus tion se mi estus vi.</p> |
| <p>7. <i>I would go tomorrow, if I were you.</i>
Mi irus morgaŭ, se mi estus vi.</p> | <p>15. <i>If he did come back, I would not let him in.</i>
Se li ja revenus, mi ne enlasus lin.</p> |
| <p>8. <i>If he had been ill, I would have come.</i>
Se li estus malsana, mi venus [estus veninta¹].</p> | <p>16. <i>If he comes back, I shall tell him to leave.</i>
Se li revenos, mi ordonos ke li foriru.</p> |
| <p>9. <i>I would go now and apologize.</i></p> | <p>17. <i>If you weren't ill, I would have refused entry.</i>
Se vi ne estus malsana, mi malpermesus [estus malpermesinta¹] eniron.</p> |
| <p>¹ En ĉi tiu frazo, kaj aliaj similaj frazoj, la simpla formo estas preferinda, se la kunteksto montras klare kiam okazis la afero. — ■</p> | <p>18. <i>Why would you do that?</i>
Kial vi farus tion?</p> |

19. *We should be home soon.*

Baldaŭ ni reestos hejme.

20. *Would you mind sending her a*

bouquet of flowers?

Bonvolu [Ĉu ĝenus vin] sendi al ŝi
bukedon da floroj.

Kompreneble, ankaŭ kelkaj aliaj vortuzoj eblas, sed la ĉefa celo de la entrepreno estis provi vian kapablon ĝustaloke uzi la *-us*-formon.

We regret that a typing error caused us to print a wrong closing date for entries to the competition, and hope that not too many of our readers were put off by this mistake.



de André Cherpillod

En la dua distrikto de Parizo, ne tre malproksime de la Nacia Biblioteko, troviĝas la *Passage Choisel*. Ĝi ne estas ordinara strato, sed tegmentita pasejo kun butikoj; ĝi iras de la *rue des Petits-Champs* ĝis la *rue Saint-Augustin*.

Nu, en la tridekaj jaroj, unu el la kafejoj de tiu pasejo estis la ĉiumonata rendevuejo de la Pariza Esperanto-grupo. Kial ĝuste tiu kafejo? Pro tio ke la kelnero, iu Ferrari, estis Esperantisto. Antaŭ ol esti kelnero li praktikis diversajn metiojn: li sinsekve estis hartondisto kaj taksiŝoforo. Li ne estis tre sperta Esperantisto, tiel ke Raymond Schwartz diris iam pri li, kun sia kutima humuro: *Kelkfoje Ferrari / povas erari*.

Sed Ferrari estis tre fervora Esperantisto, eĉ iom fanatika. Kiam iu el la kunvenantaro, pro pigreco, parolis ne plu Esperante sed France, la brava kelnero grumblis: *kia sovaĝulo! kia krokodilo!* Ĉar li konsideris ke paroli

nacilingve en Esperantista rondo estas ago de sovaĝulo. Kaj en lia buŝo, la vorto krokodilo signifis sovaĝan beston, sovaĝulon.

La uzado de tiu vorto amuzis la grupanojn, kiuj rapide ŝanĝis ĝin al verbo: li krokodilas, ni krokodilas, ktp. Tiel la Esperanta leksiko pliriĉiĝis je unu verbo: *krokodili* – *paroli nacilingve en Esperantista medio (PIV)*.

Iom post iom tiu dirmaniero internaciigis. El tiu antikva tempo, ĝis antaŭ nelonge, restis vivanta nur Roger Bernard, kiu ĉeestis la naskiĝon de la *krokodilado*. Bedaŭrinde, li mortis la 10an de aŭgusto, precize naŭdekjara.

Estas sciate ke en la medio de TEJO naskiĝis postmilite la verbo *aligator* – *paroli nacilingve en lingvo kiu estas gepatra lingvo nur de parto de la ĉeestantaro kaj ankaŭ verbo kajmani* – *paroli nacilingve en lingvo kiu estas gepatra lingvo de neniu ĉeestanto* (difinoj troveblaj en *Knedu*

min Sinjorino! de Renato Corsetti.

Sed io mankas. Lastjare en Greziljono mi interŝanĝis kelkajn Volapukajn vortojn kun iu samideano: *ĉli-polli gudiko?* — *si, vemo gudiko, danob oli* (traduko: ĉu vi dormis bone? — jes, tre bone, mi dankas vin). Ĉiokaze neniŭ taŭgas el la tri ĉi-supre cititaj verboj, ĉar ni parolis ne na-

cilingve sed internacilingve, kvankam ne Esperante, en Esperantista medio.

Por tio, oni eble povus krei la plian neologismon *gaviali*. Ĉu? Tiel, estus reprezentitaj la kvar bestoj de tiu amema kaj aminda reptilia ordo.

Sed ĉu tio valoras la penon? La *gavialado* estas tiel malofta evento...

[el *Heroldo de Esperanto*, 9(1988)/2000]

WHAT IS A PARTICIPLE?

by Marcel Leereveld

In English

In English it is a special form of the verb. There are two such forms:

(1) the so-called *present participle* ending in **-ing** (*learning, writing, singing*)

(2) and the so-called *past participle* ending in **-ed** (*learned*) or in **-en** with a vowel change (*broken*), or being irregular (*learnt, thought, put, taken*). Rule: in English a participle is nothing else but *a form of a verb*.

Does a participle indicate in English the time of the action, or who does the action (= “voice”), or whether it is a verb, a noun, an adjective, an adverb, or another part of speech?

NO, IT DOES NOT

Here are examples to show that on its own a participle does not indicate any of the above:

Time

He is *going* home. (= present)

He was *going* home. (= past)

He will be *going* home. (= future)

The participating members are *tired*. (= present, i.e. “past in the present”)

The participating members were *tired*. (= past)

The participating members will be *tired*. (= future)

The potatoes being boiled are... (= present)

The *boiled* potatoes are... (= past)

The potatoes going to be *boiled* are... (= future)

That cart is being *drawn* by one horse. (= present)

That horse has *drawn* that cart until its death. (= past)

That cart will be *drawn* by another horse. (= future)

So a participle in English does not indicate present, past, or future.

Does a participle indicate, in English, who does the action (= “voice” either “active” or “passive”?)

NO, IT DOES NOT:

The horse has drawn the cart. (= active = passive for the active)

The cart is being drawn. (= passive)

The child *having left* school... (= actives)

The child *having* been *left* behind...
(= passives; “having” = active for the passive)

The water has *boiled* for two minutes already. (= active)

The water has been *boiled* by me, not by him. (= passive)

So: the form of the so-called “present participle” and the form of the so-called “past participle” in English do not indicate whether they are either active or passive..

Is a participle a special part of speech (verb, noun, etc.)?

NO, IT IS NOT

(although it is most of the time a verb):

The horse is *drawing* the cart. (= verb)

the cart is *drawn* by the horse. (= verb)

The horse has *drawn* the cart. (= verb)

Having arrived in time, we had a rest. (= verbs)

Being drawn by the horse, the cart goes fast. (= verbs)

The *going* was hard. (= noun)

The *downtrodden* will be the *annointed*. (= nouns)

The *dying* will not be the *forgotten*. (= nouns)

The *pursuing* of the *escaped*. (= nouns)

Eating rabbits [= for eating] and *eating* habits. (= nouns)

Eating rabbits [= which are eating] and *eaten* crops. (= adjectives)

Lost time can't come back. (= adjective)

The *promised* announcement was

very promising. (= adjectives)

Referring to your letter,... (= adjective or adverb)

According to his statement, and *compared* with... (= adverbs)

His note *regarding* the trip and *following* his... (= prepositions)

I have here two books *including* the Koran. (= preposition)

In Esperanto

In Esperanto a participle is **not** a verb but essentially a special **adjective**. “Special” because:

(1) it has special adjectival suffixes:
-anta, -ata, -inta, -ita, onta, ota;

(2) because the special adjectival suffix can only be added to a verbal stem:

dorm-, ven-, est-, manĝ-, revid-, fordon-, etc..

Note that some other, non-participle, suffixes can also only be added to a verbal stem:

-ado, -ebla, -ema, -enda, -inda, -ilo.

(3) because (unlike in English!) the special suffixes distinguish the time (present, past, future) as well as the “voice” (active or passive);

(4) because the adjective can have as a supplement the object (*la kato manĝanta la muson*) of, and/or an adjunct of the verbal stem (*la virino estas eksidonta sur la seĝon; la muso estas manĝita de la kato*).

Note that some other suffixes can also have supplements related to the verbal stem: *la nutraĵo estas manĝenda de la infano; la ludoj estas komenceblaj post la dua horo.*

Of all the suffixes, only *-anta, -ata, -inta, -ita, onta, ota* fulfill all the above

mentioned four conditions, and can, if one wants to, be called “participles” in Esperanto (i.e., *special adjectives*). The adjectival suffixes — *-ebla*, *-ema*, *-enda*, *-inda* fulfill only three or two or one of the conditions. So do substantial suffixes added to verbal stems: *manĝaĵo*, *manĝulo*, *manĝado*, *manĝilo*. So also do verbal suffixes added to verbs:

prononciĝi, *prononciĝi*, (*akvo*)*verŝumi* kampon.

As with all Esperanto words, simple (*martelo*) or derived (*manĝebla*) or compound (*maŝinskribi*), the basic category (noun, etc.) may be changed into another category (*marteli*, *manĝeblo*, *maŝinskriba*), or receive another suffix (*martelado*, *manĝebligi*, *maŝinskribilo*). Thus we often come across words like *trinkanto* (= a person drinking), *riparatas* (= is being repaired), and *fininte* (= while having finished), as well as *trinkantaro*, *riparataĵo*, and *fininteco*.

Since in Esperanto we classify derivatives (= words with a prefix or suffix) only according to with what part of speech (noun, etc.) they combine, and according to whether they are basically either substantial (*manĝilo*), or adjectival (*manĝema*) or verbal (*manĝigi*), we do not need to use the term “participle” at all. Moreover, remember that in English a participle is often preceded by either a form of “to be” or by a form of “to have” (when it developed out of an objective predicative), while in Esperanto *only* by a form of “esti” (or “resti” etc.): *I have eaten* → *mi estas manĝinta* (**never** “havas”!). □



RECENZO PRI AUSTALASIAN- ESPERANTO DICTIONARY

de Marcel Leereveld

(parto 2)

(Daŭrigo de la sekcio “Eraroj en la enhavo):

14. La fruktoj de mia Feijoa sellowiana ne aspektas ovformaj, sed pli kukumetformaj.

15. Ĉar la folioj de la ordinara figo estas pli grandaj ol tiuj de *Ficus macrophylla*, MORETON BAY FIG (ambaŭ kreskas en mia ĝardeno), ŝajnas nesaga nomi ĉi tiun *foliega*, malgraŭ la Latina nomo.

16. (Sub FLOWER: Kion signifas *spiko de ruĝa floro*? Ĉu ne estu “spiko da ruĝaj floroj”?)

17. Ĉu FRUITERER ne estu *fruktlegomvendisto*?

18. *Kanguruideo* ktp. ne sufiĉas por JOEY; necesas “poŝkanguruideo” ktp.

19. LANTANA ne estas *herbo*, nek *de la pesto*, do “malutila planto” (ankaŭ kreskigata utila planto povas “*trudi sin*”).

20. Mi vidis viandomuŝojn de pluraj koloroj; ĉu ne plibonas simple “muŝego”, vorto ankoraŭ ne uzata por iu speco?

21. EUCALYPTUS DUMOSA estu “tigrîĉa” anstataŭ “tigoza” (vidu PIV-on pri tio).

22. *Domtolaĵo* estas malklarega por MANCHESTER.

23. La *kantalupo* havas “verukplenan” (ne *verukozan*) haŭton.

24. (Sub METHYLATED SPIRITS): kion

signifas “denaturigita? Ĉu “prenita el la naturo”?

25. Mankas la tipe Aŭstralia arbo NOTHOFAGUS, la fago de la suda hemisfero.

26. La NORTHERN TERRITORY **ne** estas *memreganta*, ĝi estas simple provinco, dum Viktorio estas ŝtatprovinco (**ne ŝtato!**).

27. NUCLEAR FREE estas misnomo, ĉar enestas nukleo. Devas esti: “senatomnuklea”.

28. NUGGETY = muskolforta.

30. (Sub PADDY): “dornhava” kaj “forte fibra”.

31. Ĉu papajo vere estas “*alta arbo*”, kiel la araŭkarioj?

32. SPARROW ne povas esti “*dompasero*” (= pasero tenata en domo), sed urbpasero.

33. GENERAL STORE ne estas pli multkvanta ol, ekz., Coles, ĝi estas simple “kutimajbutiko”.

34. (Sub VEGEMITE): “*Aŭstralazianoj* estu “kelkaj Aŭstralazianoj”.

35. “*Arbŝirmilo*” ŝirmas arbon; WIND-BREAK = perarbŝirmilo.

36. YABBY ne estas *kankro* sed “kankreto”.

37. HYMENOSPORUM FLAVUM (= NATIVE FRANGIPANNI) ne povas nomiĝi “*Aŭstralia franĝipano*”, ĉar ĝi ne apartenas al la sama familio, la floroj estas tute malsimilaj, kaj ĉar ili apenaŭ odoras. Ĝi estas sufiĉe alta arbo.

38. (Sub WHINGE): “*malgravaj*” estu “malgravaj kaj gravaj”.

39. Avokado: frukto kutime manĝata en salatoj aŭ individue.

40. (Sub BLUE): = brulsenton (sensa-

cio = emocia nocio).

41. (Sub BRONZEWING): “*krom*” havas origine du kontraŭajn signifojn; ĉi tie oni uzu “escepte de”.

42. COATHANGER = vestpendigilo.

43. (Sub FLAX): “*cedi*” ne donas klaran signifon.

44. (Sub GO): = celen iru rapide, ĉar “*moviĝas*” ne signifas iradon.

45. HONGI = nazinterpremo, ĉar “*nazpremo*” signifas aŭ premi sian nazon kontraŭ io aŭ premi ies nazon per siaj fingroj.

46. LEATHERWOOD: mielplenaj floroj.

47. FEED en Aŭstralio nenecese estas abunda kaj nenecese estas freŝa kaj nenecese estas herbaĵo kaj nenecese estas sur bieno.

48. FREEZE: ĉiu tempo estas “*daŭra*”.

49. GALAH: naivulo ne estas stultulo.

50. GRANNY FLAT ne estas nur “*poravina*”.

51. GRASS TREE kreskas ankaŭ en sufiĉe sekaj regionoj (oriento de Tasmanio).

52. Kial enestas la Sudafrika KNIPHOFIA UVARIA, kiun oni kreskigas ĉie en la mondo?

53. LANTANA estas herbaĉo en multaj landoj, kaj originas el Sudameriko.

54. Ĉu “MONTE” estas Aŭstralazia vorto? Ĉu ni jam estas Usonanoj?

55. OUTBACK ne povas esti “*forejo*”, ĉar Brisbano estas forejo por mi en Melburno.

56. Kial enestas Sudafrika PROTEA, kiu ne kreskas sovaĝe en Aŭstralazio?

57. WEEPING SPINIFEX ne ploras, ĝi estas “*penda*”.

58. APPLE = pomo; APPLE-MYRTLE = angophora.

59. Mankas la du Aŭstraliaj Araucarias.

60. TO BOT ne estas “almozi” sed “pruntaĉi”.

Gramatikaj eraroj

1. APPLE ISLE: oni ne kultimas fruktoĝardenojn, sed fruktarbojn.

2. CHILD ENDOWMENT ne povas esti “infanpago” sed “infansubvencio”.

3. COACHWOOD: ligno ne povas esti “prifarebla”, ĝi estas “prilaborebla”.

4. “*Tujtuja*” estas infanetlingvo; devas esti “tujega”; same kial “plenplena” estu “tutplena” aŭ “pleneĝa”.

5. “*Brutpeli*” - peli per bruto; devas esti “bruton peli”.

6. Ĉu “EVERLASTING” vere daŭras eterne? Ĉu ne “daŭrega” aŭ “multjara”?

7. “*Laborista kastulo*” tute malsamas al “laborkastulo”.

8. “*Riĉ-*” estas adjektivo, do “*senriĉulo*” devas esti “malriĉulo”.

9. “*Pulovero*” ne estas “ero”, do “pulovro” sufiĉas.

10. “*Altboto*” ne eblas, nur “alta boto”; ĉu vi havas “blankdomon” kaj “brunŝuojn”? (Vidu *PAG*-on pri tio!).

11. “*La triagrande urbo*” **ne** signifas “third largest”; devas esti “la **trie** plej granda urbo”.

12. “*SENFLUGIVA*” = nefluga.

13. *Teatra nomo* = artista nomo.

14. (Sub MILK): “*liverkurso*”? Ĉu oni devas studi la liveradon? Eble la alia “kurso” devas esti “lecionaro” aŭ “lecionkurso”.¹

15. (MUDSKIPPER): kio estas “*okulnaĝiloj*”?

16. Ĉu Zamenhof kreis pli ol du ŭ-diftongojn?: *Niŭeo* = Niueo, tute facile prononcebla.

17. (PAKAPOO): *konfuziga* = konfuza (aŭ konfuzaĵo); “konfuzi” estas transitiva verbo.

18. (SUGARBUSH): “*kreskas*” ne eblas; devas esti “kiu kreskas” aŭ “kreskanta”.

19. (TOKELAU): *anoj* = **kies** anoj.

20. (WHITEBAIT): “*fiŝeto*” devas esti “fiŝetoj”, pro “*kiujn*”.

21. BRACHYCHITON = Braĥiĥito.

22. ECHIDNA = Eĥidno. (Ĉu la verkistoj emas diskriminacii kontraŭ unu el la literoj de Zamenhof?)

23. FIBRO-LITE ne estas “3. *fig* kastulo” (= kiu okupiĝas pri kastoj), sed “kastano”.

24. JOHNNYCAKE = diska kuko (ne *diskkuko*, kio estas “kuko por disko”).

25. (NUCLEAR): Laŭ *PIV* “*povumcentraloj*” ĝuste estu “energicentrejoj”.

26. (PROP): Ĉevalo ne “*ekhalti*” sed “*ekhaltas*”.

27. (SEE YOU): = “Ĝis reo”. (“*Ĝis la*” estas gramatike sensecaĵo [**ne** en la Greka].)

28. *Moloko* = Moloĥo. (Diskrimina-

¹ Ĉi tio vere aspektis tre enigma, al mi. Post kontrolo mi trovis ke temas pri la Angla termino MILKRUN, kiu estis tradukita “liverkurso” en la vortaro de Harry/Fox. En *PIV* mi trovis ĉe KURSO “2 Vojlinio, uzata aŭ intencata, por regule kunigi du punktojn”, senco de “kurso” kiun mi neniam vidis en la Esperanta uzado, kaj ĉiukaze ne taŭga por MILKRUN. — ■

cio?)

29. Ofte bonaj vortaristoj (kaj ĝisfundaj Esperantistoj) ne estas Esperantologoj. Ke tio estas la kazo ankaŭ ĉi tie, montras la apero de la sekvan-taj gramatikaj monstraĵoj. Evidente mankas al la verkistoj kaj la profunda kono de lingvaj fenomenoj, kaj la konscio pri la diferenco inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. Kvankam tiuj monstraĵoj estas malmultaj, kaj kelkaj el ili uzataj jam de Zamenhof (neniu avertis lin), ilia enesto en la vortareto tuj malaltigas ĝian (cetere bonan) reputacion pri fidebleco; ilia uzo nuntempe ne plu estas pardonebla. Evidente lingvisma profundeco malaplikatis. Tio estas tre bedaŭrinda, des pli ĉar ili estus povintaj serĉi helpon ĉe Esperantologoj fidindaj (kvankam ĉi-lastaj plu malabundas en la Esperanto-mondo). Jen la malperloj:

a) La uzo de “*Eŭropido*” ktp por indiki posteulon de Eŭropanoj (Eŭropanido), ktp. Praktiki ĉi tie la Regulon pri Neceso kaj Sufiĉo egalas al uzo de “*Ŝi estas mia patro*”; la regulo ja ne aplikiĝas, se forlaso de vortparo kreas alian signifon. “*Eŭropido*” signifas aŭ “pli junan kontinenton Eŭropan” aŭ “posteulon de mita persono Eŭropo”. Se konsekvencaj, ili uzus ankaŭ “klubino”-n por “klubanino” ktp.

b) La uzo de “*far*” por “ate de”, la prepozicio (ĝenerale “de”) por indiki la originan subjekton de nun pasiva agsignifo. Ĉu la verkistoj ankoraŭ ne scias ke natura karaktero de ĉiu prepozicio (en ĉiuj lingvoj do) estas ke ĝi funkcias kiel aktiva verbo sekvata de rekta objekto: “La poemo *far la poeto” = “La poemo faras/is la poeton”. Ili eĉ uzas ĝin nenecese, dum Zamenhof klare diris ke post pasiva participo la

prepozicio ĉiam estas “de” por la origina aganto (“verkita *far = de la poeto). Tiu “pliriĉigaĵo” alproksimiĝas diletantismon. Cetere sameraras “peristo” por “aganto”, ĉar “peri” signifas “uzi ion”: la vojaĝo peris vagonarojn = ĝi estis per vagonaroj.¹

c) La stranga senordeco de geografiaj k.a. nomoj, kie aperas ĉiaj formoj, kun kaj sen streketoj, kun kaj sen ĉefliteroj, kaj eĉ kun ĉeflitero simple en la mezo de vorto (ekz Brito, pra-Maoria): Novkaledonia, Sud-Afrika, Jork-Kabo, Monto Cook, Lulil-Monta, Jorkkaba, Nord-Aŭstralio, Sudaŭstralio, ktp. Cetere ili ne konscias ke preferindas uzi unu neŝanĝeblan radikon por unu memstara nocio, kie la partoj de etnolingva vorto ne havu ties apartajn signifojn: Bosjmano (“Boŝmano” estus “mano de boŝo”); Blumontaro, Novzelando (aŭ Njuze-lando); Sudaŭstralio (= Saŭstralio; Sud-Aŭstralio enhavas Viktorion), ktp; ĉiuj estas nedivideblaj radikoj, plej ofte necesaj neologismoj (kiel preskaŭ ĉiuj geografiaj vortoj). Simila strangaĵo estas “jura-fratulo”.

ĉ) La negramatika uzo de infinitivo, ekz. “adverbo modifii verbon” anstataŭ “modifanta (kiu modifas) verbon”.

d) La uzo de “denove” por “refoje”, dum “denove” signifas “el de nov(ec)o” = el de kiam io estis nova (kiel dekomence), kiel en ekz. “Mi posedas la aŭtomobilon denove = el de kiam ĝi

¹ Mi ne akordas kun Marcelo pri la verbo “peri”, ĉar ĉiu lingvo, inkluzive Esperanton, uzas enradike establiĝintajn idiotismojn, kaj la verbo “peri” estas tia. Sed li plene pravas pri “far” kaj la superflua uzado de ekstra vort(er)o apud aŭ anstataŭ la jam Fundamenta “de” por indiki originan aganton. — ■

estis nova”.

e) La uzo de la akuzativo interne de (kunmetita) vorto, ekz. *ĉionfaristo”, kie eĉ la erarplena *PIV* ne plu uzas tiun antikvaĵon. Aŭ ĉu la verkistoj deziris malplieŭropigi la lingvon, uzante Vietnamlingvan kutimon enmeti sufikson (= infikson) en la mezon de vorto (kat-ino = kainto)? La samo validas por ekz. *sinmortigo (= simortigo) en pluraj kazoj.

f) La stranga uzo de “ge-” antaŭ senseksaj vortoj, kiaj geedukado kaj genecesejo. Ĉu ni revenis al la prima-

tiva kredo ke ĉiu objekto havas aŭ inan aŭ malinan sekson? Aŭ ĉu ni uzu ankaŭ “necesejino” kaj “boedukado”?

[Finota en la januar-februara *ESK*]

[Marcel Leereveld petis aperigi la ĉisekvan postnoton:

“Se legantoj trovas kontraŭecon inter la lingvaj principoj de Marcel kaj lia neobeo ante tiujn siajn principojn en la ĉi supra recenzo (kaj en aliaj artikoloj), ili konsciu ke lia stilo estas laŭleĝe ŝanĝita de la redaktisto en pluraj kazoj.”

Detalojn trovu sur p.2 en la teksto “Se vi deziras legi ion, verku artikolon!” — ■]

LAŬ LA INTERRETO

• **La epokfara artikolo “Komputaj maŝinoj kaj inteligenteco”** publikigita de A. M. Turing en 1950 estas havebla en tre bona Esperanta traduko ĉe la retadreso..... Ĝi estos legebla ĉe tiu adreso ĝis 2001-08-28 (je tiu dato la rajto publikigi la tradukon estos ekvalidiĝinta). En la artikolo Turing diskutas la demandon: Ĉu eblas konstrui penskapblan komputilon. Li argumentas ke tio ja eblas.

• **La estraro de la Akademio de Esperanto** decidis starigi novan dissendan liston, cele al konatigo de la temoj diskutataj ene de la akademio.

Ĝen pli da detaloj:

Ofte la diskutoj ene de la Akademio de Esperanto havas intereson ankaŭ por aliaj personoj ol la membroj. Tial la estraro decidis starigi dissendan liston cele al konatigo de la akademiaj temoj. La nova listo dissendos la mesaĝojn kiujn la membroj mem vol-

as diskonigi ekster sia rondo. Ĉiu povos aliĝi al ĝi kaj kontribui al la interŝanĝo de ideoj.

Se vi volas aliĝi al la listo “Akademia diskuto” kaj poste ricevi la mesaĝojn de tiu listo, sendu malplanan mesaĝon al la adreso:

[<akademia-diskuto-subscribe@egroups.com>](mailto:akademia-diskuto-subscribe@egroups.com)

Mi tre esperas ke tiu servo utilos al nia lingvo.

Christer Kiselman,
Vicprezidanto de AdE

• **Netscape 6, praversio 3** nun ebligas al uzantoj de Macintosh legi retpaĝojn unikodajn. Oni bezonas uzi unikodkapablajn literarojn. Tiaj literaroj estas jam inkluzivataj en Macintosh OS 8.5 kaj OS 9, tiel ke por uzi la novan version de Netscape neniu speciala aranĝo estas bezonata. Nur funkciigu Netscape-6-on, entajpu la deziratan adreson, kaj vi aŭtomate vidos la unikodajn retpaĝojn kun la Esperantaj supersignitaj literoj. Komento: la aktuala praversio 3 de

Netscape 6 ŝajnas relative stabila, kaj, kvankam iomete nerapida, facile uzebla.

• **Katalogo de la Internacia Esperanto-Muzeo:** La Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon, realigas ekde 1996 unikan projekton: la kreon de la elektronika katalogo TROVANTO, konsultebla en Interreto.

En la nuna momento troviĝas jam pli ol 9 400 rikordoj (dokumentoj) en ĝi, kaj tiu nombro kreskas ĉiunmonate. Jam nun ĝi estas la plej granda katalogo pri Esperanto kaj interlingvistiko.

• Kiuj dokumentoj estas indikitaj en TROVANTO?:

Libroj, broŝuroj, eksterkomercaj publikigaĵoj, manuskriptoj, aŭd- kaj vidkasedoj, kompaktdiskoj, sciencaj artikoloj en libroj ktp. (sed ne revuoj).

• Laŭ kiuj kriterioj oni trovas la dokumentojn? Laŭ aŭtoroj, titoloj, titoloj, temoj, eldonejoj, eldonlokoj, jaroj k.t.p.

La Aŭstria Nacia Biblioteko financas la kreon de TROVANTO. La daŭrigo de la laboro tamen povas okazi nur, se la Esperantistoj ĝin fakte bezonas. Tio signifas: se sufiĉe da homoj utiligas TROVANTO-n en Interreto. Tial ni invitas vin regule viziti ĝin.

Ĝia adreso:

http://www.onb.ac.at/online_s/onspdbfr.htm

Alia eblo aliri estas tra la hejmapaĝo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <http://www.onb.ac.at/sammlgn/safr.htm>

Se vi volas esti regule informata pri la evoluo de TROVANTO, bonvolu skribi al jena adreso:

Mag. Helga Farukuoye Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michael-

er Kuppel, AT-1010 Wien; <helga.farukuoye@onb.ac.at>

Nia retkatalogo:

http://www.onb.ac.at/ev/online_s/onspdbfr.htm aŭ en kazo de ŝanĝo nur: <http://www.onb.ac.at> kaj de tie al “collections” aŭ “Sammlungen”, kie vi trovos la Internacian Esperanto-Muzeon kaj ankaŭ ĝian datumbankon!

—fonto: ret-info

• **ILEI-bulteno** estas komputila komunikejo por simplaj tekstoj, sen bildoj kaj formatigo. ILEI (Internacia ligo de Esperantistaj Instruistoj) uzas la bultenon por diskonigi freŝajn novaĵojn kaj por formi konsulteblan arĥivon de bazaj dokumentoj.

La bulteno estas trovebla ĉe:

<http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html>

Jen la nuna enhavo:

Eduka projekto “Interkulturo” (bazaj informoj)

Kvazaŭa lernejo T. Sekelj (laŭsalona gvidilo)

Kvazaŭa lernejo T. Sekelj (alfabeta indekso de enhavo kaj ligoj)

34a Infana Kongreseto en Zagrebo
ILEI subtenis la Infanan Kongreseton (en Hadassim)

Okulo — lernilo por etuloj

Didaktika helpilo (A. Melnikov)

Estraro de ILEI

Statuto de ILEI

Regularo pri ekzamenoj pri instru-kapablo

Internacia Pedagogia Revuo 2000/3

Juna amiko 2000/3

Kial ILEI-bulteno?

Aliaj edukaj retpaĝoj:

ILEI:

<http://lps.uniroma3.it/ilei>

Kvazaŭa lernejo

<http://lps.uniroma3.it/kler>

Registro de instruistoj

<http://lps.uniroma3.it/eler>

Juna amiko

www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto
IPR

www.nl-papa.hu/ipr

33a Infana Kongreseto

www.uea.org, poste tra “Servoj” kaj
“Kongresoj”

bildoj ĉe:

www.esperanto.org/uk2000/iik/posti-ike/index.html

Informis: Stefan MacGill
stefan.macgill@galamb.net

[Fonto: *ret-info*]


DEZIRAS KORESPONDI

Anjo Mattson deziras korespondi paper-poŝte aŭ/kaj retroŝte. Ŝi estas Usonano, edzino, klasikpianistino. Aliaj interesoj: lingvoj, belaj artoj, naturo, kaj sovaĝa vivo. Ŝi serĉas gekorespondantojn tutmonde, aĝo pli-malpli 50-55 jaraĵ. Retadreso: [<anjomatts@aol.com>](mailto:anjomatts@aol.com)

Zenon Pietrzykowski deziras korespondi kun geknabinoj de Aŭstralio per leteroj aŭ bildkartoj. Li interesiĝas pri historio, geografio, kulturo, kaj muziko. Zenon havas 20 jarojn kaj estas studento. Lia adreso estas Wymyslow 190, 27-415 Kunow, Pollando

Ŝerco por vi

Unu tagon Islamano, Hinduo kaj fervorulo de la piedpilkluda grupo “Adelajdhaveno” alvenis samtempe al hotelo. Bedaŭrinde estis nur unu ĉambro libera en la tuta hotelo. Klarigis la hotelestro ke tiu ĉambro havas nur du litojn, sed ke en proksima stalo oni povas dormi tute senpage. Ili iom plendis, sed ĉar estis neniu alia solvo, la Islamano diris ke li volonte dormos en la stalo.



La Hinduo kaj la fervorulo de la piedpilkluda grupo “Adelajdhaveno” estis ĵus endormiĝintaj, kiam iu frapis la pordon. Tiu estis la Islamano. “Mi bedaŭras”, li diris, “sed estas porko en tiu stalo, kaj ĉar mi estas Islamano, mi ne sentas min komforta dividante mian liton kun ĝi.”

“Neniu problemo”, diris la Hinduo. “Mi dormos tie anstataŭe.”

Do li iris al la stalo, kaj la fervorulo de la piedpilkluda grupo “Adelajdhaveno” kaj la Islamano restis en la hotelĉambro. Ili estis ĵus endormiĝintaj, kiam iu frapis la pordon. Tiu estis la Hinduo.



“Mi bedaŭras”, diris li, “sed estas bovino en la stalo, kaj ĉar mi estas Hinduo, mi ne sentas min komforta dividante mian liton kun ĝi.”

La fervorulo de la piedpilkluda grupo “Adelajdhaveno” malbonvole konsentis iri dormi en la stalo, lasante la Islamanon kaj la Hinduon en la hotelĉambro. La Islamano kaj la Hinduo estis ĵus endormiĝintaj, kiam sonis frapo sur la pordo. Tie staris la porko kaj la bovino. [Laŭ *Tamen Plu*]

DIVERSAĴOJ

• **Aŭstralia Esperanto-Asocio** okazigos sian ĉefkunvenon vendredon la 19-an de januaro 2001, ekde la 19-a horo, en International House, Melbourne, kun la sekvanta provizora tagordo:

1. Prezento de la raporto de la prezidanto
2. Prezento de la raporto de la sekretario
3. Prezento de la raporto de la kassisto
4. Aprobo de la raportoj
5. Elekto de estraranoj
6. Traktado de eventualaj proponoj kaj demandoj skribe proponitaj de aliginta organizajo aŭ de du au pli da membroj.

• **Dum la fina ceremonio de la Universala Kongreso de Tel Avivo** la estraro de UEA informis ke ĝi decidis akcepti la inviton de Sveda Esperanto-Federacio, ke la UK en la jaro 2003 okazu en Gotenburgo, la dua urbo de la lando. Tiu estos la kvara UK en Svedio. La kongreso okazos ene de la urbo mem inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto.

[E] Eventoj]

• **Esperanta poŝtmarko por UK Zagreb:** Laŭ informo de Kroata Poŝto, la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Kroatio ricevos sian poŝtmarkon. La Poŝtmarko por la Universala Kongreso de Esperanto estos unu el 19 porokazaj poŝtmarkoj en la eldonplano de Kroata Poŝto por la jaro 2001. (En la jaro 1997 Kroata Poŝto eldonis poŝtmarkon honore al la 1-akongreso de Kroataj esperantistoj. La eldonkvanto de la poŝtmarko estis 300 000 ekz. kaj ĝi estas ankoraŭ ricevebla.)

[E] Eventoj]

• **E-poŝtaj adresoj:**

Ŝanĝoj kaj korektoj

David Poulson: <d.poulson@eudoramail.com>

• **<http://www.esperanto-radio.net/>** (la Korea Esperanto-radio adreso) disponigas ĉe sia URL aron da fotoj el la UK en Tel-Avivo, kun la voĉoj de la fotitoj. Inter ili ni rimarkis:



Sandor Horvath

kaj



Kep Enderby

du Aŭstraliaj Esperantistoj kiujn legantoj de *Esperanto sub la Suda Kruco* bone konas

• **Hungario** estas inter tiuj malmultaj landoj, kie la ŝtato oficiale rekonas la Internacian Lingvon. Pasintjare oni akceptis novan leĝon kiu transformis la strukturon de la ŝtate rekonitaj lingvo-ekzamenoj. En la unua paŝo estis rekonitaj nur 7 fremdaj lingvoj, kaj nun, post plurmonata klopodo, la 25-an de septembro oni akreditis ankaŭ Esperanton!

Tio signifas ke oni denove povas plenumi ŝtate rekonitajn lingvoekzamenojn ankaŭ pri la Internacia Lingvo. Ĝia sekvo estas ke oni denove raj-

tas fari abituriantan ekzamenon je Esperanto, ĝi estas utiligebla ankaŭ kiel kondiĉo por ricevo de altlernejaj diplomoj, kaj oni eĉ rajtas ricevi kromsalajrojn en koncernaj laborejoj.

Plej grava estas la supra “diplom-kondiĉo”, ĉar ekde 3 jaroj studentoj en altlernejoj kaj universitatoj rajtas ricevi sian diplomon, nur se ili havas 1 aŭ 2 ŝtate rekonitajn lingvo-ekzameno(j)n.

• **El Popola Ĉinio** ĉesos aperi en presita eldono je la fino de ĉi tiu jaro. Ek de 2001 ĝi estos havebla nur rete kaj senpage. La redakcio informas ke tiuj kiuj antaŭpagis por la revuo, povos ricevi por la restanta sumo librojn eldonitajn de Ĉina Esperanto-Eldonejo.

[fonto: ret-info]

• **Anonco pri la elekto de triono de la membroj de la Akademio de Esperanto:** Per ĉi tiu anonco la estraro de la Akademio de Esperanto alvokas al prezento de kandidatoj por la venonta elekto de triono de la membraro.

Ĉi-jare estos elekteblaj 17 membroj.

1. Por fariĝi kandidato, Esperantisto devas esti proponata de almenaŭ kvin akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn naciajn lingvojn.

2. La kandidato devas sendi al la Prezidanto de la Akademio, prefere per retposŝto, viv-protokolon, en kiu aperu personaj informoj (kompleta nomo, dato de naskiĝo, adresoj ordinara kaj reta, telefonnumeroj), instrulataj (sciencia kaj faka instruo ricevita, profesia kariero, scio de naciaj lingvoj) kaj priesperantaj (Esperanto-agado kaj tute aparte pri publikigaĵoj en kaj pri Esperanto).

Krome, la kandidato deklaru sian

akcepton de la kandidateco, sian fidelecon al la Fundamento de Esperanto kaj sian pretecon por la laboroj de la Akademio.

La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. En okazo de nombro-egaleco de voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

Ĉi tiuj reguloj ne aplikiĝas al akademianoj kiuj finas nun sian periodon de aktiveco. Ili estas aŭtomate rekondidatigataj se ili ne rifuzas tion. Ili validas por Esperantistoj kiuj ne estas nun membroj de la Akademio.

La proponoj kaj ĉiuj necesaj informoj kaj deklaroj devas atingi la prezidanton aŭ la sekretarion de la Akademio plej laste la 30-an de novembro 2000-a.

Geraldo Mattos, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Rua Dr. Joao Motter 98, BR 81210-260 Curitiba PR, Brazilo. <mattos@super.com.br>

Renato Corsetti, Sekretario de la Akademio de Esperanto, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italujo. <corsetti@itelcad.it>

• **Raporto de la Estrarkunsidoj de NZEA:** Raportas Dennis Pease. Post mia lastafoja raporta, la estraro kunsidis 3-foje, je la 26a de junio, la 14a de aŭgusto, kaj la 16a de septembro. Sekvas resumo de aferoj pritrakitaj.

1) **Komisiono pri Oceanio.** S-ro B Fox (Komisiito pri Oceanio) raportis pri kunveno kun kelkaj estraranoj por diskuti kiel plifortigi la bonan laboron de S-ro Desailly. Oni decidis sendi leteron al S-ino Wendy Percival en Samoo, kiu daŭrigas la Esperanto-instruon, por danki kaj kuraĝigi ŝin. S-ro Fox informos S-rojn K Enderby kaj R Corsetti de UEA pri la reko-

mendo ke S-ino J Bishop kaj S-ro B McDonald anstataŭigu S-ron D Weidmann kaj S-inon R Schultz kiel anoj de la komisiono. S-ro Fox diris ke li demisios kiel kunordiganto de la Komisiono je la fino de aŭgusto sed pretas resti kiel ano de la Komisiono. Li proponis ke S-ro B McDonald fariĝu kunordiganto. En aŭgusto, S-ro Fox informis ke S-ino Agnes Bray renkontis S-ron Kappenberger en Samoo sed ni perdis kontakton kun 2 personoj en Tahitio. S-ro Fox intencas fondi bultenon por konservi kontakton inter la Esperantistoj en Oceanio.

2) Kongreso 2001. La estraro elektis Alpers Lodge en Newmarket kiel la kongresejon, kaj la kongreso okazos de la 5a ĝis la 7a de januaro. La kotizo estos \$35 kaj la matenaj kaj posttagmezaj tetrinkoj kostos \$4 tage. La partoprenontaj mem zorgos pri manĝaĵoj en Newmarket, kie restoracioj kaj kafejoj abundas. Ili ankaŭ devos mem aranĝi sian loĝadon. Programo kaj aliĝilo troviĝos en la venonta numero de *Arĝenta Filiko*.

3) Proponitaj ŝanĝoj al la Reguloj de NZEA. La estraro proponis kelkajn ŝanĝojn al la reguloj kaj prezentos ilin al la membraro por aprobo ĉe la jarkunveno. Klarigoj kaj detaloj aperos en *Arĝenta Filiko*.

4) Viz-Prezidanto de NZEA. Ni gratulis nian Vic-Prezidanton, s-ro D Ryan, kiu gajnis premion pro siaj komercaj studoj kaj veturos al Anglio. Li estos for dum 13 monatoj kaj la estraro decidis doni forpermeson dum tiu periodo. S-ro D Pease anstataŭos lin ĝis li revenos.

5) Arĝenta Filiko. Estis diskuto pri la enhavo kaj S-ro Fox petis artikolojn kiel eble plej baldaŭ. Ni esperis pretigi la bultenon je la 16a de septembro sed devis prokrasti la laboron ĝis la 30a.


6) NZEA Hejmpaĝo. Estrarano informis ke la adreso de la hejmpaĝo ŝanĝiĝis kaj nun estas pli mallonga kaj taŭga: www.geocities.com/Esperanto-nz.

7) Australasian Esperanto Dictionary. S-ro McDonald gratulis Ges-rojn Fox pro la sukcesa lanĉo de la vortaro de R Harry kaj B Fox. Ĝi okazis ĉe Bennett's Bookshop en New Lynn, sabaton, la 29an de julio.

8) Morto de S-ino Ellen Lymburn. La estraro decidis sendi kondolencan karton al la familio kaj peti S-inon J Knight verki nekrologon por *Arĝenta Filiko*.

9) Artikolo en Christchurch Press. S-ro D Dewar raportis ke la *Press* aperigis longan artikolon pri la ĉeesto de Erin McGifford ĉe la UK en Montpelier, Francio.

10) Indiĝenaj Dialogoj. S-ro B McDonald raportis ke li ricevis informon de S-ino G Sutton pri invito al Maoria reprezentanto partopreni en la internacia movado Indiĝenaj Dialogoj. Okazis diskuto pri kiel NZEA povus helpi kaj ni decidis peti pli da informo.



PO Bokserp pardonpetas, sed pro iom troa festonado je sia 978a naskiĝfesto, li ne povis prilabori ĉi tiun numeron de ESK. ◻

ADIAŬ AL KARA JACKIE TURVEY

1943-2000



Interesos multajn Esperantistojn tra Aŭstralio scii ke nia kara amikino Ĝaki mortis kaj eniris la eternan vivon jaŭdon, la 3an de aŭgusto, pro cerbotumoro.

Ĝaki estis la plej juna el naŭ infanoj, kaj membro de la Fratinoj de Kompato de la Kongregacio Gunnedah ekde 1960. Ŝi estis entuziasma Esperantisto dum proksimume dek jaroj. William kaj Meryl (Sheila) Leah konigis al ŝi Esperanton, kaj poste ŝi studis la lingvon per korespondaj kursoj — kaj ŝi sukcesis konvinki multajn amikojn same fari! En 1963 Ĝaki estis la premiito de la Konkurso Mueller-Soreau por Komencantoj. Ŝi skribis en sia eseo ke ŝia alveno al Esperanto estis la plenumo de dumviva revo lerni paroli fremdan lingvon. Ŝi jam lernis skribi la Latinan, Italan, Francan, kaj Atik-Grekan, sed ŝi tute ne lernis paroli ilin. Esperanto donis al ŝi eblon paroli al eksterlandanoj, kaj lerni pri aliaj kulturoj — grandega plezuro por ŝi. Dum multaj jaroj Ĝaki ĝojoplene ĉeestis la Esperantajn Somerlernejojn en Adelajdo, Melburno, kaj en 2000 ankaŭ en Sidnejo kun sia fratino Joy kaj kun sia amiko Helen Baguley. La Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo estis mirinda sperto por ŝi.

Ĝaki revivigis la Esperanto-Klubon de Gunnedah, kiu nun kunvenadas ĉiun semajnon, kaj ŝi instruis kaj kuraĝigis la membrojn. Ŝi neniam maltrafis oportunun paroli al aliaj pri

Esperanto, kaj inviti ilin lerni ĝin. Ĉiun jaron Ĝaki aranĝis feston por la naskiĝtago de Zamenhof. La lastan jaron, 15 homoj (inkluzive de Profesoro Ron Gates — la Prezidanto de AEA — kaj lia edzino Barbara) kunvenis en Gunnedah la 15an de decembro kaj ĝuegis Esperante paroladi, ludi, kanti, kaj festmanĝi. Estis mirinda tago! Ĝaki vere estis arda ambasadoro por Esperanto.

Ĝaki kaj Helen planis ĉeesti la Universalan Kongreson en Tel-Avivo en julio 2000, sed bedaŭrinde tio ne estis ebla. Tamen, anstataŭe Ĝaki veturis en alian “Sanktan Landon” kun grandega paco kiu ĉirkaŭis ŝin kaj elvenis el ŝi kaj tuŝis tiujn kiuj amis ŝin. Ni vere sentos ŝian mankon, sed kun fido ni diras: “Ĝis la revido, kara Ĝaki!”

Helen Baguley Monahino Jackie Turvey mortis en Gunnedah, la 3an de aŭgusto, pro tumoro en la cerbo. Ŝi mortis pace; Helen Baguley legis al ŝi la 103an Psalmen en Esperanto; ŝia Esperanta Biblio estis metita sur la ĉerkon dum la funebra ceremonio. Helen esperas daŭrigi la Esperanto-grupon de Gunnedah.

Ni deziras esprimi kondolencon al la familio, speciale al Joy Turvey, Esperantistino kiu loĝas en Wagga.

Sid Wolfson
En 1994 Jackie gajnis la stipendion Mueller-Soreau por komencantoj. La premion-gajnanta eseo aperis en la Aprila *Telopeo* de tiu jaro. Ŝi estis unuanime elektita kiel la gajninto.

Mi renkontis Jackie-n kelkfoje ĉe kursaroj kaj kongresoj en Aŭstralio. Mia daŭra impresado estis pri la triopo

Jackie, ŝia fratino Joy, kaj Helen Baguley, kiuj estis ĉiam tre ĝoje ridantaj kaj ridetantaj, ĉiam plene partoprenantaj en la aferoj — lernante,

kantante kaj provante la lingvon. Mankos al ni la ridetanta vizaĝo de Jackie estontece, sed ne ŝia spirito.

Terry Manley

[el *Telopeco*]

KONKURSO *ESK* SEPT-OKT 2000 PRESENTITA DE ODLO BOKSERP

1. *I shall go tomorrow, if I feel well*
Mi iros morgaŭen, se mi palpas puton.
2. *He has surely arrived in time, if the plane has had no delay*
Li fidine havas alveninta en tempo, se la rabotilo havas havis nenium prokraston.
3. *If they can make up their minds, we know what to expect.*
Se ili povas kompletigi iliajn intencojn, ni konas kion por atendi.
4. *I would go tomorrow, if I had the money.*
Mi irus morgaŭen, se mi havus la monon.
5. *I would have left earlier, if I had kown the time.*
Mi havus maldekstren pli frue, se mi havis koninta la tempon.
6. *If I had known that, I could have helped her.*
Se mi havus sciinta tiun, mi havus povintan servi ŝian.
7. *I would go tomorrow, if I were you.*
Mi irus morgaŭen, se mi estis vin.
8. *If he had been ill, I would have come.*
Se li havis estinta malsana, mi havus venu.
9. *I would go now and apologize.*
Mi irus nu kaj esprimas bedaŭron.
10. *You should have come, if you were not ill.*
Vi devas havas venas, se vi ne estis malsana.
11. *You should come to the party; it will be terrific.*
Vi devas veni al la partio; ĝi estos terura.
12. *You would not do that to me, would you?*
Vi fartus ne fari tiun al mi, ĉu nene?
13. *Had he come, I would have left.*
Havis li venu, mi havus maldekstran.
14. *If I were you, you'd better accept it. [Note: this does not make sense.]*
Se mi estus vin, vi havas pli sana akcepti ĝin. **[Rimarku: Ĉi tiu ne faras sencon!]**
15. *If he did come back, I would not let him in.*
Se li faris venu dorson, mi ne lui-gus lin en.
16. *If he comes back, I shall tell him to leave.*
Se li venas dorson, mi diros lin testamenti.
17. *If you weren't ill, I would have refused entry.*
Se vi ne estis malsana, mi havus rubois enskribaĵon.
18. *Why would you do that?*

Kial vi farus tiun.

19. *We should be home soon.*

Ni devas esti hejmo baldaŭ.

20. *Would you mind sending her a bouquet of flowers?*

Ĉu vi mensus sendadon ŝian, sitel-
lon de flugistoj?

Contributed via the pen of Ken John Rolls.

Kontribuita tra la fantoma enferm-
ejo de Koni-Johan-Rulas. □

[Respondo #18 ricevis la Nobel-pre-
mion por literaturo. — ■

NEKROLOGO: ELLEN RYDE LYMBURN verkis Jo Knight

Ellen Lymburn (nask. Murray) naskiĝis la 4an de aŭgusto 1903 en Milton, en Suda Otago, kaj forpasis la 10an de aŭgusto 2000 kiam ŝi estis 97-jaraĝa.

Ellen estis avida lernanto kaj sukcesis en la *Proficiency Examination* kiam ŝi estis nur 14-jaraĝa. Post alterneja eduko ŝi studis por fariĝi instruisto, kaj pasigis multajn jarojn kiel infan-instruisto, kaj siatempe atingis la rangon de Estro de Infan-klasoj.

Ellen edziĝis kun Richard (Dick) Lymburn malfrue en sia vivo, kaj demisiis de la instrua profesio. Kiam Dick emeritiĝis, ili vojaĝis tra Eŭropo, inkluzive de Rusio, Norvegio, kaj Polio, kaj oriente tra Japanio kaj Ĉinio.

Dum tiuj vojaĝoj Ellen decidis studi Esperanton por helpi pri la lingvaj problemoj. Do, frue en la 1960-aj jaroj ŝi aniĝis en la Aŭklanda Esperanto-Societo kaj studis laŭ la sperta gvidado de Yvon Canty. Ellen tre ĝuis studadon kaj bonege progresis.

Post la forpaso de sia edzo en la 1970-aj jaroj, Ellen vendis la familidomon kaj translokiĝis al domo marŝdistance de la centro de Pakuranga. Ŝi daŭre vojaĝis kaj ĉeestis Universalajn Kongresojn, inkluzive de tiu en

Ĉinio kie ŝi festis sian 88-an naskiĝdaton. Ŝi ankaŭ partoprenis en Nov-Zelandaj kongresoj, kie ŝi agis en pluraĵoj.

Dum multaj jaroj Ellen instruis Esperanton ĉe la Aŭklanda Societo, kiu faris ŝin dumviva membro.

Ellen tradukis plurajn novelojn. Unu el ŝiaj plej amataj estis "La Ĝardenfesto" de Katherine Mansfield.

Ellen invitis Esperantistojn al sia hejmo por plia studado. Ŝi kutimis viziti lernejojn, kie ŝi starigis klasojn por lernantoj.

Ellen estis fidela Esperantisto, kiu vivis la idealojn, kredojn kaj principojn de D-ro Zamenhof. Ĉiu kiu plezurigis per koni ŝin sentas la mankon de ŝi kaj de ŝiaj kunesto kaj konversacio.

Adiaŭ, Ellen. [Laŭ *Argenta Filiko*]

NI RICEVIS

libreton *La migrado de la Maorioj de Nov-Zelando*, prelego en 1997 ĉe la Universala Kongreso en Adelajdo, de Brian Fox.

Ĉi tiu plaĉaspekta ilustrita broŝuro 16-paĝa enhavas la prelegon, la tekston de la Traktato de Waitangi, mapon, kaj glosarojn. □

AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Ron Gates, Wangarang, MSF 2001, Armidale NSW 2350.

☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.
rgates@metz.une.edu.au

Vicprezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

jennybishop@education.monash.edu.au

Sekretario: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.
esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

☎ (03) 9807 8589.
minglis@netspace.net.au

Vickasisto: Dianne Lukes, c/o Post Office, Meringandan Qld 4352.

NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

Prezidanto: Bradley McDonald, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.
neelam@voyager.co.nz

Sekretario: Howard Gravatt PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.
hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.
brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$26. Menu ĉe ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2000 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2000 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

INDEKSO 2000

Esperanto sub la Suda Kruco

Volumo 8, numeroj 1-6

43 = januaro-februaro
 44 = marto-aprilo
 45 = majo-junio

46 = julio-aŭgusto
 47 = septembro-oktobro
 48 = novembro-decembro

AEA:

Annual report. 44/25
 Ĝenerala kunveno de AEA 2000.
 44/7
 Inda projekto por niaj fondusoj, de
 Katalin Smideliusz. 46/9
 Jarkunveno 2001. 48/21
 Raporto pri la fondusoj de AEA. De
 Ron Gates. 44/5
 Retpaĝo de AEA. 44/8
 Somerkursaro januaro 2000:
 La somerkursaro tra la okuloj de
 nia vaganta raportisto Ĝo Tur-
 vey. 44/3
 Nia bildaro. 45/8
 Pri la somerkursaro kaj kon-
 greso. De Bob Felby. 44/4
 Somerkursaro januaro 2001. 46/16
 Ŝanĝo de la statuto de AEA. 43/8

Artikoloj:

Afero de trafiko, de Franciska
 Toubale. 48/9
 Analoj de 1999, de Diplodoko. 45/
 21
 Esperanta poŝtmarko por la UK en
 Zagreb 2001. 48/21
 Eŭro kaj Esperanto, de R. Colney.
 43/9
 Eŭropa somero kongresa tempo, de
 Franciska Toubale. 43/19
 Intervjuo kun Kep Enderby. 44/9
 Kiel libertempas la Esperantistoj?
 de Franciska Toubale. 46/9
 Kiu estas Ĝivo? de Bob Felby. 44/13
 Kulturo kaj lingvinstruado, de Bill
 Maxey. 48/3

La birdinsulo Islas Rasas, de Syl-
 van Zaft. 47/10
 La birdo kiu preskaŭ malaperis por
 ĉiam, de Sylvan Zaft. 46/3
 La stanga afero Ŝarko-brako, de
 Patriŝa Harkin. 44/16
 Nova ekspozicio ĉe Kongreso de
 Lingvinstruistoj, de Jennifer
 Bishop. 45/24
 Radio 3ZZZ. 43/13
 Universala komputila lingvo. De
 Agop Ormanĝian. 44/11

Deziras Korespondi: 43/21, 44/10,
 45/7, 48/20

Ekzamenoj:

Listo de ekzamenistoj. 45/10, 46/
 16, 47/12
 Sukcesis en la ekzamenoj. 43/13,
 44/19, 45/10, 46/16, 47/15

El la regionoj: 43/23, 46/24, 47/19

Esperantologio:

Ĉu adverba? de Marcel Leereveld.
 47/9
 Diskuto pri raŭmo. De Mark Fettes
 47/20; de Ralph Harry 47/23; de
 Marcel Leereveld 47/24
 For la gramatikon! de Marcel Leer-
 eveld. 47/18
 Kio kaj kiu, de Marcel Leereveld.
 45/17
 Kelkaj konsiloj por plibonigi stilon,
 de Valentin Melnikov. 45/18
 La deveno de *krokodili*, de André
 Cherpillod. 18/41
 La diktatoreco de la Esperanto-
 vortaroj, de Marcel Leereveld.

46/18

- La Esperanta kulturo 47/24
 La manifesto de Raŭmo [teksto].
 46/25
 Literofteco. 44/23
 Pri la Esperanta gramatiko, de
 Donald Broadribb. 48/5
 Pri la Manifesto de Raŭmo, de Jou-
 ko Lindstedt. 46/4
 Two common fallacies about Espe-
 ranto, by Marcel Leereveld. 44/
 16
 What is a participle? by Marcel
 Leereveld. 48/12

Instruado:

- Aŭstralia sekcio de ILEI: jarrapor-
 to 1999. De Jennifer Bishop. 45/
 14
 IEA 70-jara, de Atilio Orellana Ro-
 jas. 46/22
 Ne nur por lernantoj! de Jennifer
 Bishop. 46/23

Interreto:

- Akademia diskuto*. 48/18
 Akademio de Esperanto, elektoj
 por. 48/22
 Aktualajoj pri lingvoj, scienco kaj
 nova teknologio. 46/14
 Dissendolisto por gejoj. 44/21
 E-INS (diskutlisto pri Esperanto-
 instruado). 43/15
El popola Ĉinio. 48/22
 Flandra Esperanto-Ligo: libro-
 katalogo. 48/23
 Franko Luin kreis Esperantan sa-
 lutkarton. 45/19
ILEI-bulteno. 48/19
 Indiĝenaj dialogoj. 43/6
 Katalogo de la Internacia Esperan-
 to-Muzeo. 48/19
 KD-fakvortaro. 45/19
 Komika bildstrio. 45/19
 Komputaj maŝinoj kaj inteligento,
 de Turing. 48/18

- La Libroservo de UEA en Interre-
 to. 46/15
 Programo LingoMAIL. 44/21
 Ret-adresoj de Aŭstralaziaj Espe-
 rantistoj. 43/12, 44/19, 45/19, 46/
 16, 47/14, 48/21
 Retlegiloj. 45/20, 46/14, 48/18
 Ret-vortaroj. 43/16
 Revuoj *Afrikanio*, *Bulteno de la
 Londona Esperanto-Klubo*, *Fe-
 nestro*, *Andaj Ondoj*, *Rok-Gazet'*.
 44/21; *Monato* 45/19; *Ĉaŭ* 45/20;
Male 46/14

Konkursoj: Nia konkurso (*ESK* 47):
 respondoj. 48/10

Mencioj gravaj:

- AIS San Marino. 46/16
 Association for Baha'i Studies Con-
 ference in New Zealand. 46/24
 Bialostok-ano de la XX-a jarcento.
 47/15
 Cimerlinus: mapo. 45/25
 Diskoj da Esperanto-historio 44/21
El Popola Ĉinio. 43/17
Folioj de Kat-Amikaro. 46/16
Bojado. 46/17
 Hungario, rekonno de Esperanto en
 la instruado. 48/22
 Ĥristo Metev, de Bob Felby. 47/12
 Internacia bankkonto-numero
 (IBAN). 47/16
 Invito al la UK 2000 en Brazilo. 47/
 15
 Invito al Samarkando. 44/23
*Jarlibro de Internacia Naturkurac-
 ista Asocio*. 47/14
La Tradukisto [Islanda gazeto] 47/
 14
 Kolekto 2000 — plenumita misio.
 45/12
 Kontribuoj “Kial mi estas Esperan-
 tisto” 43/15, 46/17
 Kuba monero. 43/17
 La Angla — malfacila lingvo > 47/

15

La dua Esperanto-kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afrikaj landoj. 45/20

La nigra cigno. 47/14

La oka internacia Esperanto-semajno de la kulturo kaj turismo. 45/20

La vojaĝstipendio memore al Tim Einihovici. 45/11

Muzeo de moderna arto, en San Francisco. 47/14

Nekutima nova KD: *Herooj kaj martiroj de "Valsiganto"*. 46/16

Peranto por *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto*. 43/16

Reaperas la bulteno *Brisbana babilado*. 46/16

Rezultoj de eseo-konkurso en Nov-Zelando, de David Ryan. 45/23

Songazeto por blinduloj. 44/22

Tutmonda fabelkonkurso por infanoj. 44/22

UEA membrostatistiko 1999. 45/11

UK 2000 en Tel-Avivo. 48/21

UK 2001 en Zagrebo. 48/21

UK 2003 en Gotenburgo. 48/21

Zamenhof gajnis: Bjalistokano de la 20-a jarcento. 48/21

Nekrolojoj:

Ellen Ryde Lymburn (kontribuis Jo Knight). 48/26

Jackie Turvey (kontribuis Helen Baguley, Sid Wolifson, Terry Manley). 48/24

Nancy Cowling-Lawson (kontribuis Marcel Leereveld). 45/10

Plu pri Herbert Koppel (kontribuis Ralph Harry). 43/10

Vojaĝ-turista agentejo en Tehrano. 4/22

NZEA:

NZEA Kongreso 2001. 46/22, 47/13
Raporto de la estrarkunsidoj de

NZEA. 43/22, 44/8, 46/21, 48/22

Odlo Bokserp:

Jubileo de Antarktika Esperanto-Asocio. 47/26

Kalendaro 2100. 44/24

Konkurso *ESL* sept-okt 2000. 48/25

La problemo J2K. 43/26

Mia komentario. 46/26

Nova pardonpeto de Odlo Bokserp. 45/26

Pacifika Oceana Komisiono:

Oceania komisiono aprobita. 44/8

Pacifika Oceania Komisiono. (Informis Brian Fox) 43/14

Paul Desailly raportas. 46/8

Retmesaĝis Kep Enderby (Pacifika Oceania Komisiono). 43/7

Rakontoj:

Honesta knabineto. (Ilustrita de John Gallagher). 45/12

Recenzoj:

Almanako (de Prilep). Rec. Marcel Leereveld. 45/5

Apartaj mondoj: verboj kaj partipoj, de Geraldo Mattos. 45/5

Aŭstralia felix de Trevor Steele. Rec. Donald Broadribb. 43/3

Australian & New Zealand Esperanto Dictionary, red. Ralph Harry & Brian Fox. Rec. Vera Payne. 47/4

Rec. Marcel Leereveld, 47/6; 48/14

Damnita lando, de Petar Bašeski. Rec. Marcel Leereveld. 45/5

Gramatiko de Esperanto, de Miroslav Malovec. Rec. Donald Broadribb. 45/6

Hejma vortaro red. Jouko Lindstedt. Rec. Donald Broadribb. 43/5

Incubus (filmo). Anonco: 43/16; recenzo, de Terry Manley: 46/12

Kalejdoskopio, de Viktor Galeski. Rec. Marcel Leereveld. 45/5

Kio estas demokratio? de David Beetham kaj Geoffrey Sutton. Rec. Donald Broadribb. 46/20

Kulturo kaj sano de Mervyn Claxton. Rec. Donald Broadribb. 43/6

La Bahaa kredo kaj Esperanto realigantaj la mondan pacon, de Paul Desailly. Rec. Vera Payne. 45/3

La laboro de UEA por pli paca mondo, de Ulrich Lins. Rec. Donald Broadribb. 45/5

Lançadi de nova vortaro. 47/17

La pelto kaj 14 aliaj noveloj de Hjalmar Söderberg. Rec. Donald Broadribb. 43/6

Lito apud la fenestro de Betty Salt. Rec. Donald Broadribb. 43/7

Mokrokalvo la gigantegegego de Gunnar Gällmo. Rec. Donald Broadribb. 44/12

Paĉjo, kio estas rasismo? de Tahar Ben Jelloun. Rec. Donald Broadribb. 43/7

Por aktiva lingvopolitiko red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rec. Donald Broadribb. 43/6

Sonĝodramo de August Strindberg. Rec. Donald Broadribb. 43/6

Surklifa, de Sergi Elgo. Rec. Donald Broadribb. 47/3

William Auld 75 jaroj. Rec. Donald Broadribb. 44/13

Skribas la legantoj:

Maurício Borges. 47/16

Paul Desailly 44/20

Kep Enderby: 44/21

Zoran Popovic. 47/17

Trevor Steele: 47/17

Ŝercaĵoj:

Ĉu vi jam aŭdis ĝin? 45/15

Mi ne dormis! 45/11

Mortintaj ĉevaloj. 44/12

Sciu: vi devus halti se. 47/13

ENGLISH SUPPLEMENT

Esperanto word in English? 45

A new contest: *-us* or *not -us*. 47; (results: *ESK* 48, p.10

English? by Vera Payne. 47

Our translation contest: "Our amazing brain". 45

Paul Desailly in Samoa. 45

Results of the translation contest "Our Amazing brain". 46